

eLIBRO

*René de Saussure*

Fundamentaj  
reguloj de la  
vort-teorio  
en Esperanto

I N K O

*René de Saussure*

**FUNDAMENTAJ REGULOJ  
DE LA VORT-TEORIO  
EN ESPERANTO**

*Raporto al la Akademio Esperantista*

eLIBRO

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-191-7**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

MARTO 2003

# Raporto

**de D-ro René de Saussure**

prezidanto de la Komisiono pri Vortfarado

**al Prof. Boirac,**

prezidanto de la Esperantista Akademio

*Bern, la 1-an de julio 1915.*

Tre estimata prezidanto,

En 1907 Prof. L. Couturat el Parizo eldonis verketon pri *La dérivation en Esperanto*, en kiu li faris diversajn kriti-kojn al la Esperanta sistemo de vortformado. Tiuj kriti-koj ŝajnis al mi netrafaj; sed ĉar en tiu epoko ekzistis nenia oficiala sistemo de Vortformado en Esperanto (krom la reg. 11-a de la Fundamenta Gramatiko kaj la §27 de la Ekzercaro), mi opiniis, ke oni devus rebati la argumentojn de sinjoro Couturat kaj montri, ke ili estas bazitaj sur neĝusta kompreno de la vortstrukturo en Esperanto.

Sekve, en 1910, okaze la Sesa Universala Kongreso en Washington, mi publikigis sub pseŭdonimo *Antido bro-*

ŝureton titolitan *La logika bazo de Vortfarado en Esperanto*.<sup>1</sup> Tiu broŝuro enhavis proponojn faritajn al la Akademio Esperantista por starigi ĝeneralan teorion pri la vortformado.

La Akademio elektis specialan komisionon por ekzameni la proponojn de Antido kaj esplori la tutan demandon pri la vortteorio en Esperanto. Tiu komisiono konsistis el sinjoro **de Saussure**, prezidanto, sinjoroj **Hoveler** (Ĉefeĉ) kaj **Grabowsky**. En majo 1913, konforme al la raporto de la komisiono, la Akademio oficiale akceptis la du unuajn proponojn de Antido, kiuj vortiĝis jene:

1-e La Akademio opinias, ke *la vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj <reguloj de derivado>*; ke reguloj de derivado malutilus al la lingvo, agante kontraŭ ĝia normala funkciado, ke tiaj reguloj alportus arbitrajn elementojn, ĝenantajn por la skriba lingvo kaj tre malutilajn por la parola lingvo.

2-e La Akademio opinias, ke multaj aŭtoroj trouzas sufiksojn; tio estas preskaŭ neevitebla en la parolado, sed tio estigas la skriban lingvon nenecese peza. La kaŭzo de tiu trouzo kuŝas en la fakto, ke nevole oni ofte tro insistas sur ĉiu esprimota ideo por ĝin penetrigi pli forte en la spiriton

1 Respondon al la kritikoj de sinjoro Couturat mi faris ankaŭ en aliaj broŝuroj: *La construction logique des mots en Esperanto* (1910) kaj *La Vortteorio en Esperanto* (1914).

de l' aŭskultanto aŭ de l' leganto. Ĉar aliflanke oni devas ne tiel ŝparegi la sufiksojn, ke la vortoj fariĝos nekomprenblaj, estas konsilinde difini la du limojn, inter kiuj oni devas resti, tiamaniere, ke oni lasos al arbitro kaj al personaj preferoj rolon kiel eble plej malgrandan.

La Akademio do rekomendas al la aŭtoroj Esperantistaj, ke ili observu la du principojn de *neceso* kaj de *sufiĉo* (vidu p. 12), kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj formas la logikan bazon de vortkonstruo en Esperanto.

La aliajn proponojn de Antido la Akademio ne akceptis en ilia origina formo, kiu ŝajnis iom tro rigida kaj teoria por la praktika uzado de la lingvo. Mi do dediĉis la jaron 1914 kaj parton de 1915 al reorganizo de la komisiono,<sup>1</sup> reesploro de la tuta temo, komparo kun aliaj sistemoj kaj studo de la kritikoj intertempe faritaj de diversaj akademianoj kaj aŭtoroj Esperantistaj; kaj la rezulto estas la nuna raporto, titolita *Fundamentaj reguloj de la Vort-teorio*, en kiu la tuta teorio estas esprimita per 16 reguloj, klarigataj per aro da ekzemploj, kiuj montras, kiamaniere oni devas apliki la regulojn en la praktiko.

Tiun raporton mi havas nun la honoron submeti al la aprobo de la Akademio kiel definitivan formon de la vortteorio en Esperanto.

1 Sinjoro Grabowsky pro aliaj okupoj ekŝiĝis el la komisiono, kaj Prof. Cart lin anstataŭis.

# Fundamentaj reguloj de la VORT-TEORIO

## A. Difinoj.

1. *Vorto* estas simbolo de *ideo*. Trovi la ideon, kiun esprimas donita vorto, estas *vortanalizo*. Konstrui la vorton, kiu elvokas donitan ideon, estas *vortsintezo*.<sup>1</sup>

2. *Vorto simpla* estas vorto unuelementa (ekz.: **ekster**). *Vorto kunmetita* estas vorto kreata per kunigo de vortoj simplaj<sup>2</sup> (ekz.: **mal'bon'ul'o**).

3. Ekzistas kvar specoj de vortoj simplaj: la vortoj radikaj, aŭ *radikoj* (ekz.: **hom**); la vortoj prefiksaj, aŭ *prefiksoj*, kutime uzataj antaŭ radikoj (ekz.: **re** en <re'veni>); la vortoj sufiksaj, aŭ *sufiksoj*, kutime uzataj post radikoj (ekz.: **ul** en <bon'ul'o>); la vortoj finaĵaj, aŭ *finajĵoj*, kutime uzataj ĉe fino de vortoj (ekz.: **i** en <ĉirkaŭ'i>). — Ĉiuj vortoj simplaj, eĉ la finaĵoj, estas rigardataj ankaŭ kiel *memstaraj* vortoj.<sup>2</sup>

4. *Pleonasmo* oni nomas la ripeton de la sama ideo. Pleonasmoj plifortigas la ideon esprimatan (ekz.: **jes, jes!** estas pli forta, ol simpla **jes!**); pleonasmoj tamen ne

1 Sekve, *sintezi* estas tasko de skribanto aŭ de parolanto, dum *analizi* estas tasko de leganto aŭ de aŭskultanto.

2 Vidu regulon 11-an de la Fundamenta Gramatiko.

ŝanĝas la signifon de la vorto aŭ de la frazo (ekz.: **virhomo** = **viro**).

5. *Sinonimoj* oni nomas la vortojn, kiuj havas plej ofte saman signifon, kvankam malsaman formon (ekz.: **egalpezo** kaj **ekvilibro**).

6. Ĉiu vorto povas esti uzata en senco *propra* aŭ en senco *figura*. Ideo per si mem konkreta povas esti prenata en senco *abstrakta*, kaj reciproke.



## B. Vortanalizo.

7. Vorto simpla estas elemento *memstara* kaj *nevariebla*, kies signifon oni trovas en la Universala Vortaro aŭ unu el ĝiaj Oficialaj Aldonoj.

8. Radikvorto kutime esprimas ideon specialan (ekz.: **elefant**); prefikso aŭ sufikso esprimas ideon pli ĝeneralan (ekz.: **mal**, **em**), kaj finaĵo esprimas ideon *plej ĝeneralan*: **o** (ideo substantiva); **a** (ideo adjektiva); **i**, **as**, **is**, ktp., (ideoj verbaj); **e** (ideo adverba). — Tamen, vortoj el tiuj diversaj kategorioj povas esti sinonimaj (ekz.: sufikso **ec** estas sinonimo de radiko **kvalit**). — Multaj vortoj ankaŭ, kvankam ne sinonimaj, estas dependaj unu de la alia pro sia signifo mem. Ekzemple, radiko **pom** estas dependa de radiko **frukt**, ĉar la pli speciala ideo <pom> entenas en si mem la pli ĝeneralan ideon <frukt>; siavice la ideo <frukt> entenas la pli ĝeneralan ideon de <aĵ'o> konkreta, kiu fine entenas la ĝeneralan ideon substantivan <o>. Resume, en vorto **pom** sin kaŝas la diversaj ideoj: **pom(frukt)(aj)(o)**.

9. Antaŭ ol analizi vorton, oni povas forigi la neutilajn por la analizo pleonasmojn.

Ekzemple, en vorto **frat'o** la finaĵo **o** estas pleonasma, ĉar radiko **frat** jam en si mem enhavas la ideon substantivan. Do, kiel klarigis ankaŭ Zamenhof en Fund. Krest. (p. 248): **frat'o = frat**.

10. *Leĝo de renverso*. Por analizi vorton *duelementan*, oni disigas la du elementojn kaj renversas ilian ordon.

Ekzemple, **supreniri** (formo sinteza) signifas <iri supren> (formo analiza).

11. Se tiu analizo ne sufiĉas, oni elvokas la ideojn kaŝitajn *en* ĉiu elemento.

Ekzemple, en radiko **ĉeval** sin kaŝas la pli ĝenerala ideo <best>; do **ĉeval'o = ĉeval(best)'o = <besto ĉeval>, <besto (el speco) ĉeval>**.

12. Se tia analizo ankoraŭ ne sufiĉas, oni elvokas la ideon kaŝitan *inter* la du partoj de la kunmetita vorto. Tiun kaŝitan ideon oni povas ĝenerale esprimi per la vortoj <karakterizata per>.

Ekzemple, **skribtablo = <tablo (karakterizata per) skrib(i)>**.

13. Fine, se tia analizo eĉ ne sufiĉas, oni elvokas la ideojn kaŝitajn *en la kunteksto* (precipe en poezio).

Ekzemple, en la frazo:<sup>1</sup> <Kiel sigelis vi la **skribon**?>, la vorto **skribo** estas uzata en senco de **skribaĵo**, kaj la konkreta ideo <aĵ> estas elvokata nur per la kunteksta vorto <sigelis>.

1 El Hamleto, trad. de Zamenhof (p. 158).

14. Por analizi kunmetitan vorton *multelementan*, oni disigas ĝin en vortojn duelementajn.

Ekzemple: **ĉeffalkgardisto** = **ĉef**falk**gardisto**; siavice: **falkgardisto** = falk'**gardisto**; fine: **gardisto** = **gard'**isto, kaj **isto** = **ist'o** = **ist** (laŭ reg. 9-a).

## C. Vortsintezo.

15. La sintezo, aŭ konstruo, de vortoj estas fondita sur la principo de *minimuma peno*, esprimebla jene:

*Principo de neceso.* Por konstrui vorton kunmetitan, oni kunigas ĉiujn vortojn simplajn, kiuj estas *necesaj* por klare elvoki la ideon esprimotan de tiu kunmetita vorto (sen aŭ kun helpo de kunteksto).

*Principo de sufiĉo.* En la vorto konstruata oni devas eviti la *neutilajn* pleonasmojn kaj la ideojn *fremdajn* je la ideo esprimota.

16. Por konstrui vorton konforme al la du ĉi supraj principoj, oni uzas procedojn precize *inversajn* je tiuj uzataj por la vortanalizo.

EKZEMPLARO  
por la Vort-teorio

## I. VORTANALIZO

### §1. (Simplaj vortoj)

*Jen* estas pomo. — *Sur* la tero kuŝas ŝtono. — Mi havas *cent* pomojn. — Venu al mi *hodiaŭ* vespere.

Vortojn simplajn kiel **jen**, **sur**, **cent**, **hodiaŭ**, ktp., oni ne bezonas analizi, ĉar ilian signifon oni trovas en la Univerŝala Vortaro.

### §2. (Formoj gramatikaj)

Mi ne amas *obstinajn homojn*. — *Papero estas* blanka. — *Iru* for!

La formojn gramatikajn, t. e. la akuzativon, la multnombron, la tempojn verbajn, ktp., oni ankaŭ ne bezonas analizi, ĉar ilian signifon oni trovas en la Fundamenta Gramatiko. En la vortanalizo oni povas konsideri ĉiujn substantivojn kaj adjektivojn sub formo nominativa kaj ununombra (**homo**, **obstina**, ktp.) kaj ĉiujn verbojn sub modo sendifina (**esti**, **iri**, ktp.). Tamen aparte analizindaj estas la formoj *participaj*, ĉar ili naskas adjektivojn, adverbojn kaj substantivojn (Vidu §21-an).

1 La ekzemploj estas eltiritaj el la Fundamento de Esperanto.

### §3. (Finaĵoj pleonasmaj)

*Patro kaj frato. — Leono estas besto. — La patro estas sana. — Leono estas forta. — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? — Ŝi volas skribi.*

La finaĵo **o** en vorto **frat'o** estas neutila por la analizo, ĉar radiko **frat** entenas en si mem ideon de <persono> (<ulo>), do ankaŭ la ideon substantivan <o>: **frat** = **frat(o)**. Simile, radiko **fort** entenas ideon <ec'an>, do adjektivan: **fort** = **fort(a)**. Fine, radiko **skrib** entenas ideon <ag'an>, do verban: **skrib** = **skrib(i)**. Do, laŭ reg. 9-a la vortoj duelementaj **frat'o**, **fort'a**, **skrib'i**, estas redukteblaj je unu elemento: **frat**, **fort**, **skrib**.

Nu, la vortojn **frat**, **fort**, **skrib**, oni ne bezonas analizi plu, ĉar ili estas simplaj vortoj, kies signifon oni trovas en la Univ. Vort. Tamen, tiujn vortojn oni povas ankaŭ analizi per reg. 11-a kaj 10-a: **frat** = **frat(ul)(o)** = <ulo frat>; **skrib** = **skrib(ag)(i)** = <agi skrib>, <fari agon skrib>; **fort** = **fort(ec)(a)** = <kiu havas econ fort>.

### §4. (Finaĵoj o, a, i, e)

*La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno. — Mi havas centon da pomoj. — Januaro estas la unua monato de la jaro. — Venu kune kun la patro.*

La vortoj duelementaj **ekster'o**, **unu'a**, **kun'e**, ktp., estas neredukteblaj je unu elemento, ĉar radikoj kiel **ekster**, **unu**, **kun**, ktp., enhavas ideon nek substantivan, nek ad-

jektivan, nek verban, nek eĉ adverban. Tiuj vortoj estas vere *kunmetitaj* vortoj, konsistantaj el du simplaj vortoj (**ekster** kaj **o**).

Kiel tipan ekzemplon de tiaj vortoj, oni povas elekti la vortfamilion: **ĉirkaŭ'o**, **ĉirkaŭ'a**, **ĉirkaŭ'i**, **ĉirkaŭ'e**.

Nu, la ideon substantivan <**o**> Zamenhof difinis<sup>1</sup> per la vortoj <kio estas, ekzistas>. Do, laŭ regulo 10-a: **ĉirkaŭ'o** = <o ĉirkaŭ> = <kio estas, ekzistas ĉirkaŭ>. — Oni povus ankaŭ difini la ideon substantivan <o>, kiel ĝeneralan ideon de <aĵ'o> (konkreta aŭ abstrakta). Sekve, laŭ reg. 11-a: **ĉirkaŭ'o** = **ĉirkaŭ'(aĵ)o** = <aĵo (konkreta aŭ abstrakta) ĉirkaŭ>.

La ideon adjektivan <**a**> oni povas difini per la vortoj <kiu estas>. Do laŭ reg. 10-a: **ĉirkaŭ'a** = <a ĉirkaŭ> = <kiu estas ĉirkaŭ>. — La ideon adjektivan oni povas ankaŭ konsideri kiel ideon <ec'an> aŭ <rilat'an>. Sekve, laŭ reg. 11-a: **ĉirkaŭ'a** = **ĉirkaŭ'(ec)a** aŭ **ĉirkaŭ'(rilat)a** = <rilata al ĉirkaŭ>.

La ideo verba <**i**> estas ideo de <ag'o> aŭ de <stat'o>. Do, laŭ reg. 11-a kaj 10-a: **ĉirkaŭ'i** = **ĉirkaŭ'(agi)i** = <agi ĉirkaŭ>.

Fine, la ideo adverba <**e**> estas ideo de <manier'o>, kaj laŭ reg. 11-a kaj 10-a: **ĉirkaŭ'e** = **ĉirkaŭ'(manier)e** = <laŭ maniero ĉirkaŭ>.

1 Fund. Krest., p. 248.



## §5. (Sufikso *in*)

Petro, Anno kaj Elizabeto estas gefratoj. — Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto.

Li estas knabo, kaj ŝi estas *knabino*. — Mia *onklino* estas bona *virino*. — Mi havas bovon kaj *bovinon*.

En la radikoj, **Bert**, **Elizabet**, **matron**, ktp., sin kaŝas la ideo virinseksa <in>. Do, laŭ reg. 11-a kaj 10-a: **Bert'o** = **Bert(in)'o** = <ino Bert>; **matron'o** = **matron(in)'o** = <ino matron>, <ino (el speco) matron>, tute same kiel **ĉeval'o** = **ĉeval(best)'o** = <besto (el speco) ĉeval>.

Kontraŭe, en la radikoj **knab**, **onkl**, **Paŭl**, ktp., sin kaŝas nenia ideo virinseksa, sed ideo de <ul'o> (homa aŭ besta). Sekve: **knab'ino** = **knab(ul)'ino** = <ino (de) ulo knab>.

## §6. (Sufikso *il*)

Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, *kulero*, *forko*, ktp. — Mia skribilaro konsistas el *plumoj*, *krajono*, ktp. — Tial mi prenis *broson* kaj purigis la veston.

Per *hakilo* ni hakas, per *segilo* ni segas, per *fosilo* ni fosas, per *kudrilo* ni kudras, ktp.

Radikoj **fork**, **kuler**, **krajon**, **martel**, ktp., entenas en si mem la pli ĝeneralan ideon de <il'o>; do, laŭ reg. 11-a kaj 10-a: **fork'o** = **fork(il)'o** = <ilo (el speco) fork>.

Kontraŭe, radikoj **hak**, **seg**, **fos**, ktp., entenas ideon, ne de <il'o>, sed de <ag'o>, ĉar **hak** = **hak(i)** laŭ la U. V. Sekve, **hak'ilo** = **hak(i)'ilo** = <ilo (por) hak'i>, aŭ <ilo (karakterizata per) ago hak>.

## §7. (Sufikso *ej*)

La patro estas en la ĉambro. — Ili estas en la ĝardeno. — Jam estas tempo iri domon. — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo.

La edziĝa soleno estos en la nova preĝejo. — La domo en kiu oni lernis, estas lernejo. — Ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo.

La radikoj ĉambr, ĝarden, dom, ekster, Amerik, ktp., entenas en si ideon de <lok'o>, de <ej'o>, sekve: ĝarden'o = ĝarden(lok)'o, Amerik'o = Amerik(ej)'o = <ejo, kontinento Amerik>; simile dom'en = dom(lok)'en, ekster'e = ekster(lok)'e, ktp.

Kontraŭe la radikoj preĝ, lern, cigar, ktp., entenas en si ideon, ne de <lok'o>, sed de <ag'o>, de <aro>, ktp. Kun tiaj radikoj la sufikso **ej** ne estas pleonasma, kaj lern'ejo = lern(ag)'ejo = <ejo (karakterizata per) ago lern>, cigar'ejo = cigar(aĝ)'ejo = <ejo (karakterizata per) aĝo cigar>, ktp.

## §8. (Sufikso *uj*)

Sur la kameno inter du *potoj* staras fera *kaldrono*. — En mia skribotablo sin trovas kvar *tirkestoĵ*.

Mia skribilaro konsistas el *inkujo*, *sablujo* . . . — Morti por la *patrujo* estas agrable. — La Rusoj loĝas en *Rusujo* kaj la Germanoj en *Germanujo*.

En la radikoj **pot**, **kaldron**, **kest**, ktp., sin kaŝas la ideo de <uj'o>, sekve: **pot'o** = **pot(uj)'o** = <ujo (el speco) pot>. La ideo <uj> sin kaŝas ankaŭ en ĉiuj nomoj de <landoj> aŭ <kontinentoj>, (konsiderataj kiel <ujo> de siaj loĝantoj). Ekzemple: **Amerik'o** = **Amerik(uj)'o** = <ujo, kontinento ,Amerik>.

Kontraŭe, en la radikoj **ink**, **sabl**, **patr**, **Rus**, **German**, ktp., sin kaŝas ideo ne de <uj'o> sed de <aĵ'o>, de <ul'o>, de <an'o> (gentano), ktp. Kun tiaj radikoj la sufikso *uj* ne estas pleonasma, kaj oni havas: **sabl'ujo** = **sabl(aĵ)'ujo** = <ujo (por) aĵo sabl>, **Rus'ujo** = **Rus(gentan)'ujo** = <ujo, lando (karakterizata per la) gentanoj Rus>.

## §9. (Sufikso *an*)

*Francoj*, kiuj loĝas en Rusujo estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas *Rusoj*.

La *ŝipanoj* devas obei la ŝipestron. — *Luteranoj* kaj *Kalvinanoj* estas *Kristanoj*. — La *Parizanoj* estas gajaj homoj.

En la radikoj **Angl, Franc, German, Hebre**, ktp., sin kaŝas la ĝenerala ideo de <person'o> (**ul** aŭ **an**), kaj ankaŭ la speciala ideo de <gent'o>, aŭ de <regn'o>, sekve: **Franc'o** = **Franc(gentan)'o** aŭ **Franc(regnan)'o** = <ano (de la) gento aŭ (de la) regno Franc>.

Kontraŭe, en la radikoj **ŝip, Krist, Pariz**, ktp., sin kaŝas ideo ne de <an'o> sed de <aro>, de <estr'o> (religiestro), de <ej'o> (urbo), ktp. Ankaŭ en la nomoj de landoj aŭ kontinentoj, kiel **Afrik, Amerik, Aŭstrali, Azi, Ekvator, Eŭrop, Uson**, ktp., sin kaŝas ideo ne de <(gent)ano> sed de <ej'o> (regiono). Kun tiaj radikoj la sufikso **an** ne estas pleonasma, kaj oni havas: **ŝip'ano** = **ŝip(aĵ)'ano** = <ano (de la) aĵo ŝip>, **Eŭrop'ano** = **Eŭrop(ej)'ano** = <ano (loĝanto) de la ejo Eŭrop>.<sup>1</sup>

## §10. (Sufikso *estr*)

La filoj, nepoj kaj pranepoj de *reĝo* estas reĝidoj.

La ŝipanoj devas obei la *ŝipestron*. — Nia *provincestro* estas severa, sed justa. — Nia *regimentestro* estas por siaj soldatoj kiel bona patro.

Sufikso **estr** entenas en si du ideojn: ĝeneralan ideon de <persono> (**ul**) kaj specialan ideon de <ĉefeco>, <komandeco>; sekve: **estr'o** = <ĉef'o>, <komand'ul'o>. La radikoj **reĝ, kolonel, kapitan**, ktp., entenas en si mem la ideon de

1 Se ekzistas dubo, ĉu la ideo kaŝita en tia radiko estas ideo de "land'o" aŭ de "landan'o", la dubo povas esti forigita nur per la Oficiala Vortaro. Vidu ankaŭ la rimarkon ĉe fino de §12.

⟨estr'o⟩; ekzemple **reĝ'o** = **reĝ(estr)'o** = ⟨estro (el speco) reĝ⟩.

Kontraŭe, radikoj **ŝip**, **provinc**, **regiment**, ktp., entenas en si ideon, ne de ⟨estro⟩, sed de ⟨objekto⟩, de ⟨loko⟩, de ⟨aro⟩, ktp., kaj **provinc'estro** = **provinc(lok)'estro** = ⟨estro (de) loko provinc⟩.

## §11. (Sufikso *ist*)

La patro estas *tajloro*. — Laŭ la projekto de la *inĝenieroj* tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj.

Kiu okupas sin je meĥaniko, estas *meĥanikisto*, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas *ĥemiisto*. — *Diplomatiiston* oni povas ankaŭ nomi *diplomato*. — Tiu ĉi *komercisto* aldonas senpage funton da sukero.

Sufikso **ist** entenas en si du ideojn: la ĝeneralan ideon de ⟨persono⟩ (**ul**) kaj la specialan ideon de ⟨profesio⟩ (aŭ ⟨karakteriza okupo⟩). Sekve: **ist'o** = ⟨profesi'ul'o⟩ = ⟨persono, kies profesio estas⟩.

Nu, en la radikoj **tajlor**, **inĝenier**, **diplomat**, ktp., sin kaŝas la ideo de ⟨ist'o⟩. Do, **diplomat'o** = **diplomat(ist)'o** = ⟨isto (el speco) diplomat⟩, ⟨profesiulo (el speco) diplomat⟩.

Kontraŭe, en la radikoj **ĥemi**, **diplomati**, **komerc**, ktp., sin kaŝas nenia ideo de ⟨ist'o⟩, sed ideo de ⟨scienc'o⟩, de ⟨art'o⟩, de ⟨ag'o⟩, ktp. Ekzemple: **diplomati'isto** = **diplomati(art)'isto** = ⟨persono, kies okupo (estas la) arto diplo-

mati»; **komerc'isto** = **komerc(ag)'isto** = <persono, kies okupo (estas la) ago komerc>.

## §12. (Sufikso *ul*)

*Infano* ne estas matura homo. — La *filo* staras apud la *patro*. — Mi konas *Johanon*. — La *birdoj* flugas.

La *riĉulo* havas multe da mono. — *Malsaĝulon* ĉiu batas. — *Timulo* timas eĉ sian propran ombron.

Radikoj **hom**, **infan**, **Johan**, **bird**, ktp., entenas en si mem ideon de <persono> aŭ de <viva estaĵo>, esprimeblan per sufikso **ul**, Do: **hom'o** = **hom(ul)'o** = <ulo (el speco) hom>.

Kontraŭe radikoj **riĉ**, **grand**, ktp., entenas, ne la substantivan ideon de <persono>, sed la adjektivan ideon de <ec'o>. Sekve: **grand'ulo** = **grand(ec)'ulo** = <ulo (karakterizata per) eco grand>. Simile: **tim'ulo** = <ulo (karakterizata per) stato tim>, ĉar radiko **tim** entenas la verban ideon de <stat'o>.

*Rimarko*. Se oni havas dubon pri la naturo de la ideo entenata en iu radiko, oni ĝin trovas en la U. V., kiu liveras la tradukon de ĉiu simpla vorto en diversajn naciajn lingvojn. Per tiuj tradukoj oni konstatas ekzemple, ke radiko **nobel** entenas ideon de <persono> (**nobelaro** estas kategorio da personoj), do **nobel'o** = **nobel(ul)'o** = <ulo (el speco, el kategorio) nobel>. Kontraŭe, radiko **nobl** esprimas <ec'on>, do **nobl'o** = **nobl(ec)'o**, sekve **nobl'ulo** = **nobl(ec)'ulo** = <ulo (karakterizata per) eco nobl>.

### §13. (Ĝenerala sufikso substantiva **aĵ**)

*Rozo estas floro.* — *La suno brilas.* — *Jen estas pomo.* — *Antaŭ la domo staras arbo.* — *Papero estas blanka.*

Akvo estas *fluidaĵo*. — Tiu ĉi granda *altaĵo* ne estas natura monto. — Mi neniam prenas kun mi multon da *pakaĵo*. — Mi trinkis teon kun kuko kaj *konfitaĵo*.

Ĉiuj vortoj substantivaj (**roz, pom, dom, ing, er, ar**, ktp.) entenas en si mem la ĝeneralan ideon de <aĵ'o> (konkreta aŭ abstrakta). Ekzemple: **pom'o** = **pom(aĵ)'o** = <aĵo (konkreta) pom>, <konkretaĵo pom>.

Kontraŭe radikoj nesubstantivaj, kiel **fluid, alt, pak**, ktp., entenas nenian ideon de <aĵ'o>, sed aliajn ideojn (<ec'an>, <ag'an>, ktp.). Ekzemple: **fluid'aĵo** = **fluid(ec)'aĵo** = <aĵo (karakterizata per) eco fluid>; **pak'aĵo** = **pak(ag)'aĵo** = <aĵo (karakterizata per) ago pak>.

*Rimarko.* Kvankam radikoj substantivaj entenas en si mem ideon de <aĵ'o>, oni tamen povas uzi sufikson **aĵ** post radikoj substantiva, ĉar pleonasmoj ĉiam estas permesataj por plifortigi la ideon (reg. 4-a). La ripeto de la ideo aldonas al la vorto sencon pli konkretan, pli individuan ol antaŭe. Ekzemple: vorto **glaci'aĵo** esprimas objekton pli konkretan, pli individuan ol vorto **glaci'o**, kiu montras nur ĝeneralan <aĵon materialan>, <materialon>, dum **glaciaĵo** montras <individuan pecon> eltiritan aŭ faritan ĉefe el tiu materio.

## §14. (*Ĝenerala sufikso adjektiva ec*)

Oni diras, ke la *vero* ĉiam venkas. — Mi sopiras je mia perdita *feliĉo*. — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da *longo*. — La reĝido konsideris, ke tia *kapablo* havas pli grandan *indon* . . .

Lia *heroeco* tre plaĉis al mi. — Mi vivas kun li en granda *amikeco*. — Se la *bonsoneco* postulas . . .

La vortoj **ver**, **feliĉ**, **ind**, ktp., entenas en si mem ideon <adjektivan>, do <ec'an>. Sekve: **ver'o** = **ver(ec)'o** = <eco ver>; **ind'o** = **ind(ec)'o** = <eco ind>.

Kontraŭe la vortoj **hero**, **amik**, **hom**, ktp., entenas ideon, ne de <ec'o>, sed de <ul'o>. Do: **hero'eco** = **hero(ul)'eco** = <eco (karakterizata per) ulo hero>.

*Rimarko 1.* La fakto, ke la ideo <adjektiva> estas ideo <ec'a>, <kvalit'a>, montras, ke la finaĵo **a** estas sinonimo de sufikso **ec**, aŭ de radiko **kvalit**; kaj efektive: **hom'eca**, **hom'kvalita**, estas nur pleonasmaj formoj de **hom'a**. Per interŝanĝo de sufikso **ec** kun finaĵo **a**, oni povas do teorie skribi: **hom'ec'o** = **hom'a'o**, kaj tiu egalaĵo montras, ke la vorto **homeco** estas simpla substantivigo de la adjektivo **homa**, same kiel **bel'o** estas substantivigo de adjektivo **bel**.<sup>1</sup>

*Rimarko 2.* Kvankam ĉiuj radikoj adjektivaj entenas ideon <ec'an> en si mem, oni tamen povas uzi sufikson **ec** post radiko adjektiva, ĉar pleonasmoj ĉiam estas permesataj por

1 Komparu la vortfamiliojn; **bel**, **bel'o** (Fr. *beau*, *beau-té*) kaj **hom**, **hom'a**, **ham'a'o** (Fr. *homme*, *hum-ain*, *hum-an-ité*).



plifortigi la ideon (reg. 4-a) (ekz.: «Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia **beleco** kaj **boneco**»). La diferenco inter **bel'o** kaj **bel'eco** estas tute simila je la diferenco inter **pom'o** kaj **pom'frukto**, ĉar la ideo «ec» estas entenata en **bel**, kiel la ideo «frukt» estas entenata en **pom**. — Oni povas ankaŭ diri, ke en la ideo de «ec'o» sin kaŝas la pli ĝenerala ideo de «abstrakt'o», same kiel en la ideo de «frukt'o» sin kaŝas la pli ĝenerala ideo de «aĵ'o» (ĉiuj «fruktoj» estas «aĵoj», sed ne ĉiuj aĵoj estas fruktoj; simile, ĉiuj «ecoj» estas «abstraktoj», sed ne ĉiuj abstraktoj estas ecoj). Do: **bel'o** = **bel(ec)(abstrakt'o)**, same kiel **pom'o** = **pom(frukt)(aĵ)(o)**, kaj sekve: **bel'o** = «abstrakto bel» aŭ «eco bel», same kiel **pom'o** = «aĵo pom» aŭ «frukto pom». Oni povas do akcepti la du formojn: **belo** = «abstrakto bel» kaj **beleco** = «eco bel», sed tiuj du signifoj ne estas malsamaj; la unua havas nur sencon pli ĝeneralan, ol la dua. — Tamen estas konsilinde ne uzi sen-necese la sufikson **ec** post radikojn adjektiva (principo de *sufiĉo*). En la Fund. Krest. Zamenhof uzas konstante la simplajn formojn: **utilo**, **kapablo**, **indo**, **eblo**, **emo**, ktp., kaj preskaŭ neniam la pli pezajn formojn: **utileco**, **kapableco**, **indeco**, ktp.

### §15. (*Ĝenerala sufikso verba: ad*)

La *kanto* de la birdoj estas agrabla. — *Ĝojan feston!* — “Vi tute ne estas ĝentila,” diris la feino sen *kolero*. — Li estas de meza *kresko*. — Mi malbonigis mian tutan *laboron*. — Mi aŭdis du *pafojn*. — Lia hieraŭa *parolo* estis tre bela.

Por ĝia absoluta *reĝado* unuanime staris ĉiuj registraĵoj . . .<sup>1</sup> — La pazigrafio, kiu ankaŭ estas fondita sur la *numerado* de la vortoj . . .<sup>2</sup> — La lingvo internacia ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe devas konduki al ilia plena *ekflorado*.<sup>3</sup>

La vortoj **kant**, **paf**, **koler**, ktp., entenas en si mem ideon <verban> do <ag'an> aŭ <stat'an>. Sekve: **kant'o** = **kant(ag)'o** = <ago kant>; **koler'o** = **koler(stat)'o** = <stato kolere>.

Kontraŭe la vortoj **reĝ**, **numer**, **flor**, ktp., entenas ideon, ne de <ag'o> aŭ <stat'o>, sed de <ul'o>, de <aĵ'o>, ktp. Do, en vorto **reĝad'o**, ekzemple, la ideo <ag'a> estas esprimita per sufikso **ad**, kaj *nur* per sufikso **ad**, ĉar, se oni forigas tiun sufikson, restas la vorto *reĝ'o*, kiu entenas en si nenian ideon <ag'an>. Sufikso **ad** estas do sinonima de la verba ideo <ag> (fari agon), aŭ <stat> (esti, iĝi en stato), kaj sekve: **reĝ'ado** = <ago (karakteriza de) reĝ(o)>; **flor'ado** = <stato (karakterizata per) flor(oj)>.

*Rimarko 1.* La verba ideo estas ankaŭ esprimebla per finaĵo **i**. Sekve, sufikso **ad** ankaŭ estas sinonimo de finaĵo **i**. Oni povas do teorie skribi: **reĝ'ad'o** = **reĝ'i'o**, kaj tiu egalaĵo montras, ke la vorto **reĝado** estas simpla substantivigo de la verbo **reĝi**, same kiel **skrib'o** estas substantivigo de la verbo **skrib**<sup>4</sup>.

1 Fund. Krest., p. 299-a.

2 Fund. Krest., p. 260-a.

3 Fund. Krest., p. 276-a.

4 Komparu la vortfamiliojn: **skrib**, **skrib'o** (Fr. *écrire*, *écriture*) kaj **flor**, **flor'i**, **flor'i'o** (Fr. *fleur*, *fleur'ir*, *flor'ai'son*).

*Rimarko 2.* Kvankam ĉiuj radikoj verbaj entenas en si mem ideon de <ad'o>, oni tamen povas uzi sufikson **ad** post radikoj verba, ĉar pleonasmoj ĉiam estas permesataj por plifortigi la ideon (reg. 4-a), aŭ por montri nuancojn de sencio (ekz.: <Li kantas tre belan **kanton**. — La **kantado** estas agrabla okupo>). Efektive, en radikoj **kant** sin kaŝas ideo <ag'a>, ideo <verba>, sed ne <tempa>; do, **kanto** povas rilati tiel bone al ago *pasinta* (rezulto de ago) kiel al ago *nuna*.

Kiam do oni volas diferencigi la agon mem de ĝia rezulto, oni plifortigas la ideon de <ago daŭranta> per ripeto de la ideo <ad>. Ekzemple: **fend'o** = <rezulto de ago fend>, t. e. <la aro da impresoj, kiuj rezultas de la ago fend> dum **fend'ad'o** montras la agon mem konsideratan dum ĝia daŭro. Tamen, oni ne devas sennecese uzi sufikson **ad** post radikoj verba (principo de sufiĉo), ĉar plej ofte la ago ne estas distingebla de ĝia rezulto.

Oni povas tie ĉi ankaŭ rimarki, ke ideo de <ag'o> estas ideo <abstrakt'a>, do en radikoj verba kiel **skrib** sin kaŝas la ideoj **skrib(ag)(abstrakt)**; kaj sekve oni havas: **skrib'o** = <ago skrib> aŭ <abstrakto skrib>, kiel oni havas **pom'o** = <frukto pom> aŭ <aĵo pom>.

*Rimarko 3.* La lastaj du paragrafoj montras, ke la adjektiva ideo (**a**, **ec**) kaj la verba ideo (**i**, **ad**) estas simetriaj rilate al la substantiva (**o**, **aj**, **ul**). Ekzemple, de la substantivo **reĝ(o)** oni formas per adjektivigo la vortfamilion: **reĝ**, **reĝ'a**, **reĝ'a'o** = **reĝ'ec'o**, kaj per verbigo la familion: **reĝ**, **reĝ'i**, **reĝ'i'o** = **reĝ'ad'o**.

## §16. (Verbo-adjektivoj)

Lakto estas pli *nutra* ol vino. — El via buŝo eliros aŭ floro aŭ *multekosta* ŝtono. — Post *infekta* malsano oni bruligas la vestojn de la malsanulo. — Kia *ĝoja* festo! — Li estas hodiaŭ en *kolera* humoro. — Ligno estas bona *brula* materialo.

Verbo-adjektivo, kiel **nutr'a** konsistas el du partoj: la parto verba (**nutr**), kiu entenas ideon ⟨i⟩, kaj la parto adjektiva (**a**), kiu entenas ideon ⟨ec'an⟩ aŭ ⟨rilat'an⟩. Sekve, **nutr'a** = **nutr(i)'(ec)a** = ⟨kiu havas econ nutri⟩. Se la verbo estas neŭtra, ĝi entenas ideon de ⟨stat'o⟩: **koler'a** = **koler(stat)'a** = ⟨kiu estas en stato koler⟩.

Oni vidas, ke ne ekzistas granda diferenco inter **nutr'a** kaj **nutr'ant'a**, **koler'a** kaj **koler'ant'a**, ktp. Tamen oni povas fari du rimarkojn: en la formoj **nutranta**, **koleranta**, ktp., la ĉefa ideo estas la ideo de ago, aŭ stato (ideo ⟨tempa⟩ alportita de sufikso **ant**), dum en la formoj **nutra**, **kolera**, la ĉefa ideo estas la adjektiva ideo de ⟨ec'o⟩ (ideo ne-tempa); ekzemple, oni povas diri: ⟨tiun ĉi jaron nia **aga** komitato estis tute ne **aganta**⟩. Oni devas ankaŭ atenti, ke en verbo-adjektivoj, la verbo povas esti prenata en senco aktiva, aŭ en senco pasiva; ekzemple: **suspekt'a** signifas **suspekt'at'a**, kaj ne **suspekt'ant'a**.

Do, verbo-adjektivon oni povas uzi nur se la aktiveco aŭ pasiveco de la verbo estas jam evidenta per si mem (aŭ per la kunteksto).

## §17. (Sufiksoj **em**, **ind**, **abl**)

Lia edzino estas tre *laborema* kaj *ŝparema*, sed ŝi estas ankaŭ tre *babilema* kaj *kriema*. — Li estas homo *nekredinda*. — Via ago estas tre *laŭdinda*. — Ŝtalo estas *fleksebla*. — Vitro estas *rompebla* kaj *travidebla*.

La signifo de la verbo-adjektivoj estas iom malpreciza, sed ekzistas en Esperanto tri adjektivaj sufiksoj (**em**, **ind**, **abl**), kiuj estas uzataj speciale kun verbaj radikoj, kaj tiuj sufiksoj povas, kiam necese, precizigi la signifon de la verbo-adjektivoj. Ekzemple, anstataŭ diri: «Lia edzino estas tre **ŝpara**, Zamenhof uzis la pli precizan formon «*ŝparema*», kaj laŭ reg. 10-a oni havas: **ŝpar'ema** = **ŝpar(i)'ema** = «*ema ŝpar(i)*».

La sufiksoj **ind** kaj **abl** havas similan celon, sed ili donas al la verba radiko sencon pasivan. Do: **kred'inda** = «*inda esti kredata*» (kaj ne: «*inda kredi*»); **fleks'ebla** = «*ebla esti fleksata*», aŭ «*kiu povas esti fleksata*». Tiujn sufiksojn oni povas uzi nur kun verboj aktivaj, ĉar verboj neŭtraj ne posedas formon pasivan. Do, oni ne diru **brul'ebla** sed **brulig'ebla**.

## §18. (Pri regulo 12-a)

Vortoj kunmetitaj estas kreaĵoj per simpla kunligado de vortoj. Ekzemploj: *skribtablo*, aŭ *skribotablo* (= *tablo*, sur kiu oni skribas); *internacia* (= kiu estas inter diversaj nacioj); *tutmonda* (= de la tuta mondo); *unutaga* (= kiu

daŭras unu tagon); *unuataga* (= kiu estas en la unua tago); *vaporŝipo* (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo); *matenmanĝi*, *tagmanĝi*, *vespermanĝi*; *abonpago* (= pago por la abono).

Oni vidas, ke la ideoj kaŝitaj inter la du partoj de vorto kunmetita estas tre diversaj; tamen, laŭ reg. 12-a oni povas traduki ilin per la ĝenerala esprimo <karakterizata per>. Ekzemple, en radiko **skrib** ekzistas la verba ideo de <ag'o>, do: **skrib'tablo** = **skrib(ag)'tablo** = <tablo (karakterizata per) ago skrib>.

Oni povas ankaŭ uzi, anstataŭ la esprimo <karakterizata per>, la prepozicion <je>, ĉar tiu vorteto esprimas nur ĝeneralan ideon de rilato. Ekzemple: **herbo'riĉa** = <riĉa (je) herbo>.

Fine, oni rimarku, ke en kunmetita vorto la unua parto de la vorto *kvalitigas*, *specigas* la ideon esprimitan de la dua parto. Do, oni povas ankaŭ diri, ke inter la du partoj de la analizata vorto sin kaŝas ideo <adjektiva> aŭ <adverba>. Ekzemple: **maten'manĝo** = **maten'(a)'manĝo** = <manĝo maten'a>, aŭ <matentemp'a> (ĉar la ideo <temp> ekzistas en radiko **maten**). Simile: **maten'manĝi** = **maten'(e)'manĝi** = <manĝi maten'e, matentemp'e>.

## §19. (Sekvo)

Malfeliĉo ofte *kunigas* la homojn. — Mi ĝin tuj *redonis* al li. — Kie estas la *tranĉiloj*? — La angla reĝo vidinte *ĝibulon* . . .<sup>1</sup> — Por *kroni* tiujn ĉi dek ok jarojn . . .<sup>2</sup>

La reg. 12-a estas aplikebla ne nur al radikoj, sed ankaŭ al prefiksoj, sufiksoj, kaj eĉ al finaĵoj, ĉar tiuj ĉi ankaŭ estas memstaraj vortoj (reg. 3-a). Ekzemple: **re'dono** = **re'(a)'dono** = <dono re'a>; **re'doni** = **re'(e)'doni** = <doni re'e>; **tranĉ'ilo** = **tranĉ'(a)'ilo** = <ilo tranĉ'a>, aŭ per la alia metodo: <ilo (karakterizata per) ago tranĉ>; simile: **ĝib'ulo** = <ulo ĝib'a>, aŭ <ulo (karakterizata per) aĵo ĝib>. Fine **kron'i** = <i kron>, nu: **i** = (**agi**) = <fari agon>, kaj **kron** = **kron(aĵ)(o)** = <aĵo kron>; do: **kron'i** = <fari agon (karakterizatan per) aĵo kron>.

*Rimarko.* Oni vidas, ke la ofte kritikitaj vortoj **flank'iĝi**, **kun'meti**, **bon'voli**, **el'paroli**, estas tute bonaj, ĉar ili signifas, ne <iĝi flank(o)>, <meti kun>, <voli bon(a)>, <paroli el>, sed: <iĝi flank'e>, <meti kun'e>, <voli bon'e>, <paroli el'e>, t. e.: <paroli laŭ maniero el (la buŝo)>.<sup>1</sup>

Kontraŭe, la vorto **el'rigardi** (G. *aus'sehen*) estas malbona. La regula formo estus **el'vidiĝi**, sed preferinde estas uzi la vorton **aspekti**, kiu estas nun oficialigita (vidu *Oficiala Aldono*'n al U. V.).

1 Fund. Krest., p. 83.

2 Fund. Krest., p. 105.

## §20. (Rimarko pri reg. 10-a)

Mil jaroj faras *miljaron*. — Li estas nur *unufoja* menso-  
ginto. — La animo estas *senmorta*.

Kiam en kunmetata vorto unu elemento estas la *komplemento* de prepozicio, de adjektivo aŭ de nombro, oni devas ne apliki la reg. 10-an pri renverso de la vortordo; kaj tio estas komprenebla, ĉar elementon kun ĝia komplemento oni devas rigardi kiel *unu* tutaĵon. Ekzemple: **submar'a** = <a sub mar> = <kiu estas sub mar (sub maro)>, **miljar'o**<sup>2</sup> = <o miljar> = <kio estas miljar (mil jaroj)>, **enam'iĝi** = <iĝi enam (en amo)>, **ĉiutag'e** = <e ĉiutag> = <laŭ maniero ĉiutag (ĉiu tago)>, **siavic'e** =>e siavic> = laŭ maniero siavic (sia vico)>, **grandanim'eco** = <eco grandanim (granda animo)>.

Kontraŭe, la vorto **kun'igo** sekvas la leĝon de renverso kaj signifas laŭ reg. 10': <igo kun(a)>, ĉar tie ĉi la substantivo **igo** *ne estas komplemento* de la prepozicio **kun**.

*Rimarko.* El tio sekvas, ke vorton kunmetitan oni ĉiam povas dividi en du partojn (reg. 14-a), *sed ne arbitre*. Ekzemple, la vorton **internacia** oni devas legi: **internaci'a** (kaj ne **inter'nacia**). Oni havas do per reg. 10-a: **inter-**

- 1 Cetere, en Germana lingvo oni ankaŭ diras: *aus'sprechen*, kaj en Franca aŭ en Angla: *e'locution* (de la Latina *loqui*, "paroli").
- 2 La sola diferenco inter **miljaro** kaj **mil jaroj** estas, ke "miljaro" formas unu tutaĵon; la diferenco aperas pli klare en la vortoj: **triangulo** kaj **tri anguloj**. Kelkaj aŭtoroj uzas la formojn **jarmilo**, **jarcento**, **spesmilo**, **spesdeko**; tamen pli ĝuste estas trakti la nombrojn kiel la prepoziciojn kaj diri: **centjar'o**, **milspes'o**, **dekspes'o**, ktp.



**naci'a** = <a internaci> = <kiu estas inter naci(oj)>; **tutmond'a** = <a tutmond> = <kiu rilatas al tut(a) mond(o)>; **unutag'a** = **unutag(daŭr)'a** = <daŭra, aŭ daŭranta unu tag(on)>.

## §21. (*Participo-substantivoj*)

Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la *batanto* kaj Jozefo estas la *batato*. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas *juĝoto*. — Argumentoj, kiuj estas plenigitaj per multo da *citatoj* . . .<sup>1</sup>

La participaj sufiksoj entenas, krom la ideo participa, la ĝeneralan ideon verban de <ag'o> aŭ <stat'o>. Ekzemple, — en la vorto **kron'ant'o** la ideo <ag'a> estas entenata en sufikso **ant**, kaj nur en tiu sufikso, ĉar, se oni ĝin forigas, restas nur la vorto **kron'o**, kiu entenas nenian ideon <ag'an>. Oni do havas: **ant'o** = (**ag**)**ant'o** kaj **at'o** = (**ag**)**at'o**.

Nu, la finaĵo **o** signifas <aĵon> konkretan aŭ abstraktan. Do, **ant'o** povas signifi **ant'(ul)o** aŭ **ant'(aĵ)o** kaj kelkafoje eĉ **ant'(ec)o**<sup>2</sup>. Kutime: (**ag**)**antoj** estas **ul'oj**, kaj (**ag**)**atoj** estas **aĵ'oj**. Ekzemple: **bat'ant'o** = **bat'ant'(ul)o** = <ulo batant(a)>; **cit'at'o** = **cit'at'(aĵ)o** = <aĵo citat(a)>. Tamen, tiu ĉi regulo estas nefirma, kaj la precizan sencon de participo-substantivo oni povas fiksi nur per la kunteksto, aŭ per aldonado de klariga sufikso: **kon'at'ul'o**, **est'ont'aĵ'o** (principo de neceso).

1 Fund. Krest., p. 274.

2 Ekzemple: **est'ont'o** = **est'ont(temp)'o** (= tempo estonta).

## §22. (Influo de la kunteksto)

La *korpo* estas morta, la animo estas senmorta. — Kelkaj (termitoj) konstruas tureton el tero, tiel ke la *konstruo* estas tre simila je fungo.<sup>3</sup> — Mia kara, mia *belo*, estis brava juna dano.<sup>4</sup>

La *signifon* de vorto fiksas la vorto mem, sed ĝian *sencon* fiksas la kunteksto, ĉar per la kunteksto ideo per si mem konkreta povas esti prenata en senco abstrakta, aŭ reciproke (reg. 6-a). Ekzemple, en la frazoj cititaj ĉi supre, la konkretaj ideoj <korpo>kaj <animo> estas prenataj en senco abstrakta, ĝenerala. Reciproke, la abstraktaj ideoj **konstruo** (<ago konstru>) kaj **belo** (<eco bel>) estas prenataj en senco konkreta **konstru(aĵ)o**, **bel(ul)o**. Oni povas diri, ke la neesprimitaj ideoj konkretaj **aĵ** kaj **ul** estas kaŝitaj en la kunteksto (reg. 13-a).

*Rimarko.* Tiuj ŝanĝoj de senco pere de la kunteksto estas kompreneblaj en poezio, sed en prozo oni devas ne trouzi ilin. Tamen, eĉ en prozo, la multnombra formo ofte sufiĉas por konkretigi ideon abstraktan; ekzemple, la senco de la vorto **malfeliĉo** per si mem estas abstrakta (<eco malfeliĉ>), sed tiu de la multnombro (**malfeliĉoj**) povas esti nur konkreta, (<malfeliĉaĵoj>), ĉar multnombro povas rilati nur al individuaĵoj, do al konkretaĵoj.

La kunteksto ankaŭ decidas, ĉu la vorto devas esti prenata en senco propra aŭ en senco figura. Ekzemple, en la

3 Fund. Krest., p. 222-a.

4 Hamleto, p. 123, trad. de Zamenhof.

frazo: «La ŝiparo konsistis el dek **trimastuloj**», la sufikso **ul** estas prenata en senco figura, ĉar en senco propra tiu sufikso rilatas nur al «vivaj» estaĵoj.

### §23. (Sekvo)

En tiuj ĉi boteloj sin trovas diversaj *acidoj*: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj.

La esprimo «kunteksto» rilatas ne nur al la frazo, kiu ĉirkaŭas la vorton analizotan, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj cirkonstancoj, en kiu tiu vorto troviĝas. Ekzemple, en ĉiu fako de la scienco, la senco de iu vorto povas esti influata de la cirkonstanco, ke ĝi estas speciale uzata en tiu fako; alivorte, multaj vortoj povas esti prenataj, ne nur en senco *komuna*, sed ankaŭ en senco *teknika*.

Ekzemple, laŭ la U. V. radiko **acid** entenas en si ideon adjektivan (ec'an), do la komuna senco de la vorto **acid'o** estas abstrakta: **acid'o** = **acid(ec)'o** = «eco acid», kiel oni povas konstati en la frazo: «Kion vi preferas: la dolĉon aŭ la **acidon**?».

Tamen, en ĥemio la vorto **acido** alprenas sence koncretan («aĵo acid»), por eviti en tiu scienco la konstantan ripeton de la sufikso **aĵ**; cetere, la teknika senco de la vorto **acido** estas ideo pli speciala, pli preciza ol **acidaĵo**. Simile, laŭ la U. V. la radikoj **rekt**, **eben**, ktp., entenas ideon adjektivan (ec'an), do la komuna senco de la vortoj **rekto**, **ebeno** estas abstrakta («eco rekt», «eco

eben›); tamen en geometrio, la teknika senco de tiuj vortoj estas konkreta (‹aĵo rekt›, ‹aĵo eben›). Tiaj modifoj de senco havas praktikan utilon kaj nenian malutilon, ĉar por esprimi la ideon ‹eco acid›, ‹eco rekt›, ktp., oni povas uzi la formojn pleonasmajn: **acideco**, **rekteco**.

## §24. (Sekvo)

Kaj ni restos *sensaĝaj* kaj *senhelpaj* bestoj.<sup>1</sup> — Eĉ la plej malriĉaj kaj *senkleraj* vilaĝanoj.<sup>2</sup>

Per la esprimo ‹kunteksto› oni devas kompreni la diversajn cirkonstancojn, en kiuj troviĝas ne nur la analizota vorto mem, sed ankaŭ ĝiaj diversaj partoj. Ekzemple, en la vortoj **sensaĝa**, **senklera**, ktp., la radikoj **saĝ**, **kler**, kvankam adjektivaj, estas prenataj en senco substantiva, ĉar ili estas tie ĉi komplemento de la prepozicio *sen*. Do: **sensaĝ'a** = ‹a *sensaĝ*› = ‹kiu estas sen *sag(o)*›, tute same kiel **senfrukt'a** = ‹kiu estas sen *frukt(o)*›.

Simile, en la vorto **ekzercaro**, la radiko **ekzerc**, kvankam verba, estas prenata en senco substantiva, ĉar gi estas tie ĉi komplemento de la vorto **aro**. **Ekzerc'aro** = ‹aro (da) *ekzerc(oj)*›, kiel **ŝaf'aro** = ‹aro (da) *ŝaf(oj)*›.

1 Fund. Krest., p. 277.

2 Fund. Krest., p. 300.

## §25. (Sufiksoj **ig** kaj **iĝ**)

La bona virino *trankviligis* sian soifon. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi *malbonigis* mian tutan laboron.

Li *paliĝis* de timo kaj poste li *ruĝiĝis* de honto. — En la printempo la glacio kaj la neĝo *fluidiĝas*.

La sufiksoj **ig** kaj **iĝ** ambaŭ estas verbaj sufiksoj, ĉar ambaŭ esprimas verban ideon: sufikso **ig** signifas <doni econ>, kaj sufikso **iĝ**, <akiri econ>. Tiuj sufiksoj estas do plej nature uzataj post radikoj <ec'aj>, <adjektivaj>: **trankvil'igi** = <igi trankvil>; **pal'iĝi** = <iĝi pal>.

## §26. (Verboj *aktivaj*)

Mi *aĉetis* por la infanoj tableton. — Sur lia vizaĝo mi *vidis* ĝojan rideton. — Kun bruo oni *malfermis* la pordegon.

Post infekta malsano oni *bruligas* la vestojn. — Li *venigis* el Berlino multajn librojn. — Mia onklo ne *mortigis* sin mem. — *Sidigu* vin, sinjoro!

La verbaj radikoj **aĉet**, **vid**, **ferm**, ktp., enhavas en si mem ideon aktivan. Kontraŭe, la radikoj **brul**, **ven**, **mort**, **pend**, **sid**, ktp., havas (laŭ la U. V.) sencon neŭtran, sed per sufikso **ig** oni donas al ili sencon aktivan. Efektive: **brul'igi** = **brul'(a)'igi** = <igi brul'a <aŭ <brul(ant)'a>; **pend'igi** = <igi pend(ant)'a>, ktp.

Sufikso **ig** estas ankaŭ uzata post verbo aktiva, ekzemple: <Mi **aĉetigis** libron> signifas <Mi igis (iun) aĉet(anta)-libron>, aŭ: <Mi igis libron aĉet(ata) (de iu)>.

## §27. (Verboj neutraj)

La kuraĝa maristo *dronis* en la maro. — Li *sidas* apud la tablo kaj *dormetas*. — Antaŭ nia militistaro *staris* granda serio da paflegoj.

La juna vidvino *fariĝis* denove fianĉino. — Baldaŭ ni vidis, ke ni *trompiĝis*. — Li *ekscitiĝas* ofte ĉe la plej malgranda bagatelo.

La verbaj radikoj **dron**, **sid**, **dorm**, **star**, ktp., enhavas en si mem ideon neŭtran. Kontraŭe, la radikoj **far**, **tromp**, **ekscit**, ktp., havas (laŭ la U. V.) sencon aktivan, sed per sufikso **iĝ** oni donas al ili sencon neŭtran. Efektive: **far'iĝi** = **far'(a)iĝi** = <iĝi far'a> aŭ <far'(it)a>; **ekscit'iĝi** = <iĝi ekscit'(at)a>.

Sufikso **iĝ** estas ankaŭ uzata post verbo neŭtra. Tia verbo montras <staton> (ekz.: **sidi**, **stari**, **pendi**); do **pendi** signifas <esti (en stato) pend(anta), kaj **pend'iĝi** = <iĝi (en stato) pend(anta)>.

*Rimarko.* La neŭtrigo de verbo aktiva per sufikso **iĝ** estas ekvivalenta je verbo refleksa: **ekscit'iĝi** = <eksciti sin>, **trov'iĝi** = <trovi sin>, ktp.

## §28. (Sufiksoj senkarakteraj *eg, et, aĉ, um*)

En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur *montetoj*. — La forno estis *varmega*; post du horoj ĝi estis nur iom *varmeta*. — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan *rideton*.

La sufiksoj **eg, et, aĉ, um**, estas senkarakteraj, gramatike indiferentaj, ĉar en si mem ili entenas nenian ideon ĝeneralan: ili estas sufiksoj nek substantivaj, nek adjektivaj, nek verbaj: ankaŭ, nek konkretaj, nek abstraktaj. La sufiksoj **eg** kaj **et** respektive pliigas kaj malpliigas la ideon esprimatan de la vorto. Ekzemple: **mont'o, mont'et'o, mont'eg'o; varm'a, varm'et'a, varm'eg'a; rid'i, rid'et'i, rid'eg'i**. La sufikso **aĉ** aldonas al vorto sencon malestimantan. Ekzemple: **ĉeval'aĉ'o, bel'aĉ'a, rid'aĉ'i**. La sufikso **um** ne havas difinitan signifon. Ĝi estas uzata nur *por diferencigi du eblajn sencojn* de la sama vorto. Ekzemple: **kalkan'o, kalkan'um'o; kruc'i, kruc'um'i**.<sup>1</sup>

1 Vortoj kiel **orumi, butonumi** estas nebonaj, ĉar tiuj vortoj havas la saman signifon kiel **ori, butoni**.

## II. VORTSINTEZO

La vortsintezo estas la konstruo de la vorto, kiu elvokas donitan ideon. Nu, por «doni ideon», oni devas uzi vortojn, kaj tiuj vortoj formas frazon. Vortsintezo estas do simple: *kunpremo de tuta frazo en unu vorton*. Ĝi estas procedo inversa je la vortanalizo, kiu estas: *klarigo de unu vorto per tuta frazo da vortoj*.

### §29. (Simplaj vortoj)

La ideojn reprezentatajn per simplaj vortoj de la U. V. oni ne bezonas sintezi, ĉar tiujn vortojn la vortaro liveras tute pretaj por la uzo.

Ekzemple, la ideo «en la nuna tago» estas sintezita en la U. V. per la simpla kaj tute preta vorto: **hodiaŭ**.

Tamen, se la simpla vorto havas gramatikan karakteron, t. e. se ĝi entenas en si mem ideon aŭ substantivan, aŭ adjektivan, aŭ verban, oni aldonas al ĝi la taŭgan finaĵon gramatikan (**o**, **a**, **i**).

Ekzemple, se oni volas uzi memstare la simplajn vortojn **frat**, **fort**, **ind**, **skrib**, ktp., oni devas uzi la formojn: **frat'o**,



**fort'a, ind'a, skrib'i**, ktp. — Tion oni faras ne pro logiko, sed, kiel klarigis Zamenhof en Fund. Krest (p. 248), pro tio, ke en Esperanto ĉiuj substantivoj en nominativo finiĝas per **o**, ĉiuj adjektivoj per **a**, ĉiuj verboj en modo sendifina per **i**. Alivorte, finaĵo **o** estas necesa por montri la *nominativon*, kiel finaĵo **i** por montri la *modon sendifinan*. Krom tiu motivo oni povus citi aliajn: en la ĉi supraj ekzemploj, la finaĵoj **o**, **a**, **i**, konservas al la akcento ĝian kutiman lokon kaj ebligas la uzon de la formoj akuzativa kaj multnombra (**frat'o'n, frat'o'j**). Cetere tiuj pleonasmaj finaĵoj alportas en la vorton nenian malutilon, ĉar pleonasmo ne ŝanĝas la signifon de vorto (reg. 4-a).

### §30. (Kunmetitaj vortoj)

#### 1. Sintezi la ideon: <iri supren>.

Laŭ regulo inversa je reg. 10-a oni havas: <iri supren> = **supreniri**.

#### 2. Sintezi la ideon: <iĝi bela>.

Laŭ la sama regulo: <iĝi bela> = bela'iĝi. Nu, laŭ reg. 15-a (principo de sufiĉo) oni devas forigi la neutilan pleonasmajn finaĵon **a**, ĉar la radiko **bel** jam en si mem entenas la ideon adjektivan. Restas do simple: <iĝi bela> = beliĝi.

#### 3. Sintezi la ideon: <objekto, kiu portas kandelon>.

La ideo <objekto, kiu portas> estas sintezita en la U. V. per la sufiksa vorto **ing** (= **ing'o**); aliflanke, **kandel'o** = **kandel**; restas do: <ingo kandel>, kiu laŭ reg. 10-a sinteziĝas en **kandelingo**.

#### 4. Sintezi la ideon: «kiu rilatas al homo».

La ideo «kiu rilatas al» estas sintezita en la U. V. per la simpla finaĵa vorto **a**; aliflanke **hom'o** = **hom.** Do: (kiu rilatas al) (homo) = «a hom» = **homa.**

### §31. (Sekvo)

#### Sintezi la ideon: «virino matron'a», aŭ «virino el speco matron».

La ideon adjektivan «a», aŭ la ideon «el speco» oni ne bezonas sintezi, ĉar laŭ reg. 12-a tiu ideo sin nature kaŝas inter la du partoj de la konstruota vorto: «virino matron'a» = **matron'(a)'virino** = **matron'virino.** Nu, la ideo «virin» tie ĉi estas pleonasma<sup>1</sup>, do forĵetinda, ĉar tiu ideo jam ekzistas en vorto **matron.** Do, resume: «virino (el speco) matrona = **matrono.**

### §32. (Sekvo)

#### 1. Sintezi la ideon: «arbo kverk'a», «arbo el speco kverk».

Kiel ĉi supre, oni havas: «arbo kverk'a» = **kverk'(a)'arbo** = **kverk'arbo.** Sed la vorto **arb** tie ĉi estas pleonasma, do

1 Kiel ekzemplon de neutila pleonasma en naturaj lingvoj, oni povas citi la Germanan vorton: *Prinzessin*, en kiu la ideo virinseksa estas esprimita dufoje; unuafoje per la Franca aŭ Angla sufikso *esse*, kaj duafoje per la Germana sufikso *in*. La ĝusta formo estus: *Prinz'ess* aŭ *Prinz'in*, sed ne *Prinz'ess'in*.

forĵetinda, ĉar la ideo <arb> jam estas entenata en radiko **kverk**. Resume: <arbo el speco kverk> = **kverko**.

## 2. Sintezi la ideon: <arbo karakterizata per frukto pomo>.

Oni povas unue sintezi la ideon <frukto pomo> per reg. 10-a en: **pomofrukto**, aŭ **pomfrukto**, ĉar **pom'o** = **pom**. La ideon <karakterizata per> oni ne bezonas konservi, ĉar tiu ideo sin kaŝas inter la du partoj de la sintezota vorto. Restas do simple la duelementa ideo <arbo pomfrukto>, kiu laŭ reg. 10-a sinteziĝas en **pomfrukto'arbo**. Sed la ideo <frukto> tie ĉi estas pleonasma, ĉar ĝi jam estas entenata en vorto **pom**. Restas do simple, post forĵeto de la neutilaj pleonasmoj: **pomarbo** (aŭ **pomujo**, ĉar sufikso **uj** post ideo de <frukto> estas sinonimo de radiko **arb**).

## 3. Sintezi la ideon: <fruktarbo karakterizata per frukto pomo>.

La ideo <fruktarbo> estas jam sintezita; la ideon <karakterizata per> oni flankelasas; fine, la ideo <frukto pomo> sinteziĝas en **pomo**, ĉar la ĝenerala ideo <frukt> estas entenata en la pli speciala ideo <pom>; restas do: **pom'fruktarbo**, kaj tiu vorto estas nereduktebla, ĉar la ideoj <arbo>, <fruktarbo>, <pom-fruktarbo> estas ideoj pli kaj pli specialaj; sed oni rimarku, ke <pom-fruktarbo> ne estas la sama ideo kiel <pomfrukt-arbo> (= <pom-arbo>).

### §33. (Sekvo)

Sintezi la ideon: <koloro blu>.

Laŭ reg. 10-a: <koloro blu> = **blu'koloro**; nu, **blu'koloro** reduktigas je **blu'o**, ĉar la ideo <kolor> jam estas entenata en radiko **blu**.

*Rimarko 1.* Radiko **blu** entenas, krom la ideo <kolor>, ankaŭ la ĝeneralan ideon adjektivan de <ec'o>. Do, **blu'o** signifas ankaŭ **blu(ec)'o**, t. e. <eco blu>. Tamen, la du signifoj <koloro blu> kaj <eco blu> ne estas malsamaj (unu estas nur pli ĝenerala ol la alia) ĉar la ideo <kolor> ankaŭ enhavas ideon de <ec'o>. Alivorte, se oni kompare analizas la vortojn **blu'o** kaj **pom'o**, oni trovas, ke radiko **blu** entenas la ideojn **blu-(kolor)(ec)(a)** same, kiel radiko **pom** entenas la ideojn **pom(frukt)(aĵ)(o)**; oni rajtas do skribi: **blu'o** = <koloro blu> aŭ <eco blu> same, kiel: **pom'o** = <frukto pom> aŭ <aĵo pom>.

Oni povas skribi ankaŭ: **blu'o** = <abstrakto blu>, ĉar oni jam vidis (§14), ke ĉiuj ecoj estas abstraktoj. La diversaj sencoj de **blu'o**: <koloro blu>, <eco blu>, <abstrakto blu> (kaj eĉ <o blu>) estas entenataj unu en la aliaj. Tiuj sencoj estas pli kaj pli ĝeneralaj, ĉar la ideoj <blu>, <kolor>, <ec>, <abstrakt> estas pli kaj pli ĝeneralaj.

*Rimarko 2.* La vorto **blu'koloro** estas reduktebla je **blu'o**, sed **roz'koloro** estas nereduktebla, ĉar **roz'o** estas ne <koloro> sed <floro> (ekz.: <Li portas **rozokoloran** superveston kaj teleroforman ĉapelon>).

## §34. (Sekvo)

### 1. Sintezi la ideon: <kvalito feliĉ>.

Laŭ reg. 10-a: <kvalito feliĉ> = **feliĉ'kvalito**. Sed la ideo <kvalit> jam estas entenata en radikoj **feliĉ**; sekve: <kvalito feliĉ> = **feliĉo**.

### 2. Sintezi la ideon: <kvalito de reĝo>.

La vorto **reĝo** = **reĝ**. La vorteto genitiva **de** estas sinonimo de la ideo adjektiva **a**, do: <de reĝ> = <a reĝ> = **reĝ'a**. Resume: <kvalito de reĝo = **reĝ'a'kvalito**. Nu, la ideo adjektiva <a> estas ankaŭ sinonimo de la ideo <kvalit>; do, el la vorto **reĝ'a'kvalito** oni povas forĵeti aŭ finaĵon **a**, aŭ radikojn **kvalit**, kiel neutilan pleonasmon; sed, *oni ne povas forĵeti ambaŭ*, ĉar tiu ideo adjektiva ne ekzistas en la aliaj elementoj de la vorto (**reĝ** kaj **o**). Oni do alvenas al du eblaj formoj de la sintezota vorto: **reĝ'a'o** aŭ **reĝ'kvalit'o**. La unua formo estas neakceptebla, ĉar vorto ne povas havi du finaĵojn; la dua formo ankaŭ ne estas bona, ĉar en ĝi la radikoj **kvalit** okupas lokon de sufikso; pli bone do estas anstataŭigi radikojn **kvalit** per la sinonima sufikso **ec**, kaj oni tiel ricevas: <kvalito de reĝo> = **reĝeco**.

*Rimarko.* En Esperanto, *montras <kvaliton> nur tiuj substantivoj, kies antaŭlasta elemento estas adjektiva*. Ekzemple: **feliĉo**, **reĝec'o**, **trink'em'o**, ĉar la elementoj **feliĉ**, **ec**, **em**, entenas ideon adjektivan, do kvalitan.

## §35. (Sekvo)

### 1. Sintezi la ideon: «ago skribi».

Laŭ reg. 10-a: «ago skribi = **skribi'ago**. Nu, la verba ideo «i» estas sinonimo de ideo «ag». Cetere ambaŭ vortetojn **i** kaj **ag** oni povas forĵeti kiel neutilajn pleonasmojn, ĉar la verba ideo de «ag'o» jam estas entenata en radiko **skrib**. Do, fine: «ago skribi» = **skribo**.

### 2. Sintezi la ideon: «ago reĝi».

Laŭ reg. 10-a: «ago reĝi» = **reĝi'ago**. Tie ĉi ankaŭ troviĝas pleonasmo (**i** = **ag**); oni do povas el vorto **reĝi'ago** forĵeti aŭ finaĵon **i**, aŭ radikon **ag**, sed *ne ambaŭ*, ĉar la ideo verba de «ag'o» ne ekzistas en la aliaj elementoj de la vorto (**reĝ** kaj **o**). Oni do alvenas al du eblaj formoj: **reĝi'o** kaj **reĝ'ag'o**. La unua formo estas neakceptebla, ĉar vorto ne povas havi du finaĵojn; la dua formo ankaŭ ne estas bona, ĉar en ĝi la radiko **ag** okupas lokon de sufikso; pli bone do estas anstataŭigi tiun radikon per la sinonima sufikso **ad**, kaj oni tiel ricevas: «ago reĝi» = **reĝado**.

*Rimarko 1.* En Esperanto, *montras «agon» aŭ «staton» nur tiuj substantivoj, kies antaŭlasta elemento estas verba*. Ekzemple: **ag'o**, **skrib'o**, **reĝ'ad'o**, **bel'ig'o**, ktp. ĉar la elementoj, **ag**, **skrib**, **ad**, **ig**, ktp., entenas ideon verban, do agan aŭ statan.

*Rimarko 2.* El la antaŭaj paragrafoj oni povas konstati la jenan principon: *sufikson oni devas uzi nur, se ĝi alportas en la vorton ideon novan, ne ankoraŭ (aŭ ne sufiĉe) esprimitan per la aliaj partoj de la vorto.*

### §36. (Sekvo)

Sintezi la ideon: «fari la agon karakterizatan per objekto krono».

La ĉi supran ideon oni povas dividi en 3 partojn: «(fari agon) (karakterizatan per) (objekto krono)», kaj ĉiun el tiuj 3 partoj oni devas aparte sintezi: «fari agon» = **agi**, ĉar la ideo «far» estas sinonima de «ag»; «objekto krono» reduktiĝas je **krono**, ĉar la ideo de «objekto» jam ekzistas en vorto krono; cetere **kron'o** = **kron**, ĉar «kron» estas ideo substantiva. La donita ideo estas do kunpremebla en la pli simplan formon: «(agi) (karakterizata per) (kron)», kiu sinteziĝas en la vorton: **kron'agi**, ĉar la ideo «karakterizata per» sin nature kaŝas inter la du partoj de la vorto.

Nu, la ideo verba «i» estas sinonimo de la ideo «ag»; oni povas do el vorto **kron'agi** forĵeti, kiel pleonasman, aŭ la radikon **ag**, aŭ la finaĵon **i**, sed ne ambaŭ. Se oni deziras vorton en formo verba, oni konservos finaĵon **i** kaj forĵetos **ag**; la fina rezulto de la sintezo estas do: **kroni**. Kontraŭe, se oni deziras vorton en formo substantiva, oni devas anstataŭigi finaĵon **i** per finaĵo substantiva **o**; tiam oni jam ne povas forĵeti la radikon **ag** (ĉar vortetoj **ag** kaj **i** devas ne ambaŭ malaperi). Oni do havos la jenan sintezon: «ago karakterizata per objekto krono» = **kron'ag'o**, aŭ pli bone **kron'ad'o**, ĉar la ideo «ag» okupas tie ĉi lokon de sufikso, kaj **ad** estas la sola sufikso sinonima de la verba ideo «ag». Cetere, la vortfamilio **kron**, **kron'i**, **kron'ad'o** estas tute simila al la familio: **reĝ**, **reĝ'i**, **reĝ'ad'o** (vidu §15).

*Rimarko 1.* En verboj kun radiko neverba, kiel **kron'i**, **najl'i**, **sang'i**, **flor'i**, ktp., la naturo de la ago ne estas esprimita, kaj sekve la logika signifo de tiaj verboj estas pli-malpli duba; oni povas diri, ke tiuj vortoj iom pekas kontraŭ la principo de neceso. Aliflanke, se oni provus esprimi per sufiksoj la naturon de la ago, oni ne povus trovi sufiksojn tute taŭgajn, eĉ se oni akceptus la sufiksojn uzatajn en la teknika lingvo (**iz**, **if**, ktp.). Se oni dirus ekzemple **kron'izi**, **sang'ifi**, ktp., anstataŭ **kron'i**, **sang'i**, ktp., tiuj formoj ne estus pli bonaj, ĉar ili pekus kontraŭ la principo de sufiĉo, kiu estas tiel grava kiel la principo de neceso. Efektive, per uzo de sufiksoj tro precizaj, oni ne povas eviti la enkondukon de *fremdaj* ideoj, ne entenataj en la ideo esprimota, ĉar ne ekzistas kaj ne povas ekzisti aparta sufikso por ĉiu speciala ideo. Ekzemple, sufikso **iz** signifas «ŝmiri per», «ornami per»; nu, oni povas «kronizi (ornami per kronoj) tombon, ĉerkon», aŭ «kronizi (ornami per krono) la pordon de luksa veturilo», sed tiuj ideoj estas tute aliaj ol la ideo esprimita per la vorto **kroni**.

Resume, kiam la apliko de la du principoj de neceso kaj de sufiĉo alkondukas al du eblaj formoj de la vorto konstruata, unu formo *minimuma*, malpreciza, kaj unu formo *maksimuma*, tro preciza, oni *prefere devas elekti la formon minimuman*, ĉar ĝi estas la pli simpla, la pli malpeza kaj la pli konforma al la naturaj lingvoj kaj al principo de minimuma peno. Tamen, la formon minimuman oni devas akcepti nur, se la kunteksto klarigas la signifon de la vorto. En mala okazo la formo maksimuma estas konsilinda; sed, ĉar la nombro de sufiksoj ne estas sufiĉa por esprimi ĉiujn ide-



ojn, oni povas uzi ankaŭ radikvortojn. Ekzemple la tro elastan signifon de la verbo **ŝtoni** oni povas precizigi per la formoj maksimumaj: **ŝtonfrapi**, **ŝtontrafi**, **ŝtonpafi**, **ŝtonmortigi**, ktp.

Tiu elekto estas afero, tiom de stilo, kiom de logiko, ĉar en Esperanto la stilo sin montras ne nur en frazkonstruo, sed ankaŭ en vortkonstruo.

*Rimarko 2.* Oni ne devas fari konfuzon inter <verbo> kaj <radiko verba>. Ekzemple: **kron'i** estas verbo, kvankam radiko **kron** estas neverba, kaj restas neverba eĉ en la vorto **kron'i** pro tio, ke simplaj vortoj estas elementoj *nevarieblaj*. En Esperanto la finaĵoj estas memstaraj vortoj, do **kron'i** estas ne simpla vorto sed vorto kunmetita el du simplaj vortoj: substantivo **kron** kaj verbo **i**, same kiel **maŝin'skribi** estas vorto kunmetita el substantivo **maŝin** kaj verbo **skribi**.<sup>1</sup>

Do, por ke vorto estu verbo, estas nenecese, ke ĉiuj elementoj de la vorto estu verbaj; sufiĉas, ke ĝia finaĵo estu verba (ekz.: **ĉirkaŭ'i**); por ke vorto estu substantivo, sufiĉas, ke ĝia finaĵo estu substantiva (ekz.: **ĉirkaŭ'o**); por ke vorto estu adjektivo, sufiĉas, ke ĝia finaĵo estu adjektiva (ekz.: **ĉirkaŭ'a**).

### §37. (Influo de la kunteksto)

Sintezi la ideojn: «aĵo konstruita», «aĵo konstruata», «aĵo konstruota».

Laŭ reg. 10-a tiuj ideoj sinteziĝas en **konstruit'aĵo**, **konstruat'aĵo** kaj **konstruot'aĵo**, sed tiuj formoj estas iom pezaj, kaj se la kunteksto permesas, oni devas ilin mallongigi: se la ideo de «aĵo» estas jam elvokata de la kunteksto, oni povas forĵeti sufikson **aĵ**, kiel neutilan pleonasmon, kaj uzi la simplajn participo-substantivojn **konstruit'o**, **konstruat'o**, **konstruot'o**; se la ideo «tempa» kaj la ideo «pasiva» estas memevidentaj pro la kunteksto, oni povas forĵeti la participajn sufiksojn kaj uzi la formon **konstru'aĵo**, aŭ eĉ simple **konstru'o** kiel en la ekzemplo de §22.

Tamen, se la «konstruaĵo» estas io materia, preferinde estas konservi la konkretigan sufikson **aĵ**, ĉar objekto materia estas la plej alta grado de konkreto, kaj la formo **konstru'o** («ago konstrui») estas tro abstrakta. Kontraŭe, se oni parolas pri io konkreta sed ne materia, ekzemple «vortkonstruaĵo», la formo **vortkonstruo** estas sufiĉe taŭga, ĉar ĝi signifas ne nur «ago konstrui» sed ankaŭ «rezulto de la ago konstrui».

- 1 Ankaŭ en Franca lingvo la vorto *couronn'er* estas vorto kunmetita el substantivo *couronn(e)* kaj verbo *er*. En Angla lingvo oni esprimas la verban ideon *i* per vorteto *to*; oni havas do laŭ reg. 10-a., (Fr.) *couronn'er* = **kron'i** = *i* kron = (A.) *to crown*.

### §38. (Komparo kun la naturaj lingvoj)

Sintezi, en Franca lingvo, la ideon: «Français de Lyon».

La vorteton *de* oni povas flankelasi, ĉar ĝi esprimas simple la rilaton inter la du partoj de la kunmetota vorto. Do, laŭ reg. 10-a: «*Français (de) Lyon*» = **Lyon'Français**; sed la ideo «*Franç*» jam estas entenata en la nomo de la urbo «*Lyon*», do post forigo de la neutila pleonasma, la vorto **Lyon'Français** reduktiĝas je **Lyon'ais**, kiel **pom'frukto** reduktiĝas je **pom'o**, aŭ **skrib'ago** je **skrib'o**, kaj oni havas la sintezon: «*Français de Lyon*» = **Lyonn'ais**.

De tio oni konkludas, ke la vortteorio de la lingvo Esperanto estas la sama, kiel tiu de la naturaj lingvoj.

Tion ankaŭ montras<sup>1</sup> la similo inter la vortfamilioj: E. **hom**, **hom'a**, **hom'ec'o**; F. *homme*, *hum'ain*, *hum'an'ité*; G. *Mensch*, *mensch'lich*, *Mensch'lich'keit*; A. *man*, *man'ly*, *man'li'ness*.

Tiuj vortfamilioj montras, ke de ideo konkreta (kiel ekzemple: **reĝ**) oni povas per adjektivigo aŭ verbigo ricevi la kunrespondan ideon abstraktan (**reĝeco** aŭ **reĝado**). 'En la naturaj lingvoj ekzistas eĉ vortĉenoj ankoraŭ pli longaj; ekzemple en Franca lingvo:

*homme*, *hum'ain*, *hum'an'ité*, *hum'an'it'aire*, *hum'an'it'ar'isme*;  
*règle*, *régl'er*, *règl'e'ment*, *règl'e'ment'er*, *règl'e'ment'a'tion*.

Sed oni tuj vidas, ke tiaj vortĉenoj estas eblaj nur pro tio, ke oni prenis la saman vorton jen en senco abstrakta, jen

1 vidu §14.

en senco konkreta: de la konkreta ideo «homme» (**homo**) oni naskis per adjektivigo la abstraktan ideon «humanité» (**homeco**); iom post iom oni donis al la abstrakta ideo «humanité» sencon konkretan (**homaro**); tiam, de la konkreta ideo «humanité» (**homaro**) oni povis denove eltiri per adjektivigo novan ideon abstraktan: «humanitarisme» (**homareco**). Sed en Esperanto ne ekzistas konfuzo inter homeco kaj homaro, sekve anstataŭ unu longa vortĉeno oni havas pli logike du apartajn ĉenojn:

**hom(o), hom'a, hom'ec'o; homar(o), homar'a, homar'ec'o;**

simile:

**regul(o), regul'i, regul'ad'o; regular(o), regular'i, regular'ad'o.**

### III. ALDONO

(Por logikistoj kaj lingvistoj)

#### §39. (Principo de returneblo)

En Esperanto ĉiu vorto estas aparta konstruaĵo, kies signifo dependas nur de la enhavo de tiu vorto (almenaŭ por vortoj konsiderataj sen kunteksto). Ekzistas tamen dependo, parenceco inter la vortoj, kiuj apartenas al unu sama familio; ekzemple, la vorton **reĝa** oni povas konsideri kiel derivaĵon de **reĝ(o)** per adjektivigo, kaj oni vidis (§14), ke la vorto **reĝeco** povas esti konsiderata kiel substantivigo de la adjektivo **reĝa**.

Nu, la principo de returneblo konsistas en tio, ke se oni revenas al la origina ideo per derivado inversa, oni devas trovi la originan vorton, kaj reciproke. Ekzemple, la vorton **reĝeco** oni povas ricevi per substantivigo de adjektivo **reĝa**, do reciproke, per adjektivigo de substantivo **reĝeco** oni devas trovi la formon **reĝa**; kaj efektive, se en vorto **reĝeco** oni anstataŭigas finaĵon **o** per finaĵo **a**, oni ricevas unue **reĝeca**, sed sufikso **ec** estas sinonimo

de finaĵo **a**, do la vorto **reĝeca** estas pleonasma kaj reduktiĝas je **reĝa**.

Simile, per substantivigo de verbo **reĝi** oni ricevis la vorton **reĝado** (vidu §15); reciproke, per verbigo de substantivo **reĝado**, oni ricevas unue la verbon **reĝadi**, sed pro la sinonimeco **i = ad**, la vorto **reĝadi** estas pleonasma kaj reduktiĝas je **reĝi** (origina formo).

Do en Esperanto *la vorto reprenas sian originan formon ĉiufoje, kiam oni revenas al la origina ideo*, kia ajn estis la vojo sekvata inter la deirpunkto kaj la alvenpunkto.

#### §40. (Pri pleonasmoj)

Oni vidis, ke la vorto **homulo** estas pleonasma kaj reduktebla je **homo**.

Tamen de tio oni ne devas konkludi, ke la formo **homulo** neniam povos esti uzata. Efektive, preskaŭ neniu vorto estas absolute unusenca, kaj pro tio oni ne devas blinde apliki la regulojn de vortteorio.

Sufikso **ul**, ekzemple, signifas ne nur ⟨persono⟩, ⟨homo⟩, sed ofte ankaŭ ⟨viva estaĵo⟩, ⟨besto⟩, kaj en tiu ĉi senco sufikso **ul** jam ne estas sinonimo de **hom**. Ekzemple, inter nombro da simioj oni povus elmontri iun, kiu speciale sin distingas per homeco, nomante ĝin ⟨homulo⟩. En tiu ĉi kazo la vorto **homulo** ne estas pleonas-

ma, ĉar ĝi signifas, ne **homhom'o**, sed **hombesto** (‹besto hom'a›).

Similajn rimarkojn oni povas fari koncerne la vortojn **reĝeca** kaj **reĝadi**, kiuj laŭlogike estas redukteblaj je **reĝa**, **reĝi** (§39), sed ne ĉiam, ĉar finaĵo **a** enhavas ideon ne nur ‹ec'an› sed ankaŭ ‹rilat'an›, kaj sufikso **ad** enhavas ideon ne nur de ‹ag'o› sed ankaŭ de ‹daŭr'o›.

Fine, la sama sufikso povas esti jen pleonasma, jen ne pleonasma laŭ la ideo, kiu sin kaŝas inter la sufikso kaj la radiko. Ekzemple, sintezante la ideon ‹ujo (el speco) kaldron›, oni trovas: **kaldron'ujo**, kiu reduktiĝas je **kaldron'o**; sed, se oni sintezas la ideon ‹ujo (por) kaldronoj›, oni trovas la vorton **kaldronujo**, kiu estas nereduktebla. En la unua kazo la vorto kaldronujo estas pleonasma, ĉar **kaldron** kaj **uj** rilatas al la sama objekto, dum en la dua kazo ili rilatas al malsamaj objektoj.

## §41. (Sufiksoj inversaj)

1. *Sufiksoj il kaj ad.* La ago kaj la ilo per kiu oni faras la agon estas ideoj inversaj. Ekzemple, la vorto **tranĉ'o** montras agon, dum la vorto **martel'o** montras ilon; reciproke **tranĉ'il'o** estas ilo, kaj **martel'ad'o** estas ago. Nu, kion signifas la vortoj: **tranĉ'il'ad'o** kaj **martel'ad'il'o**? La unua signifas: ‹ago (karakterizata per) tranĉilo›, t. e.: **tranĉ'o**, kaj la dua signifas: ‹ilo (karakteriza-

ta per) martelado», t. e. **martel'o**. Sekve: **tranĉilado** = **tranĉo**, kaj **marteladilo** = **martelo**. Alivorte sufikso verba **ad** nuligas la sufikson substantivan **il**, kaj reciproke: **il** + **ad** = 0, kaj **ad** + **il** = 0.

2. *Sufiksoj ul (aŭ aĵ) kaj ec*. La kvalito kaj la persono (aŭ objekto), kiu posedas tiun kvaliton estas ideoj inversaj. Ekzemple, la vortoj **kapabl'o**, **blu'o**, ktp., montras ecojn, dum la vortoj **reĝ'o**, **tabl'o**, ktp., montras ulojn aŭ aĵojn; reciproke, **kapabl'ulo**, **blu'aĵo**, ktp. estas uloj aŭ aĵoj, kaj **reĝ'eco**, **tabl'eco**, ktp., estas ecoj. Nu, estas evidente, ke: **kapabl'ul'ec'o** = <eco (de) kapablulo> = **kapabl'o**; **blu'aĵ'ec'o** = <eco (de) aĵo blua> = **blu'o**. Simile: **reĝ'ec'ul'o** = <ulo (karakterizata per) eco de reĝ> = **reĝ'o**, kaj: **tabl'ec'aĵ'o** = **tabl'o**. Sekve, sufikso adjektiva **ec** nuligas la sufiksojn substantivajn **ul** aŭ **aĵ**, kaj reciproke, t. e.: **aĵ** + **ec** (aŭ **ul** + **ec**) = 0, kaj **ec** + **aĵ** (aŭ **ec** + **ul**) = 0.

3. *Sufiksoj ig, iĝ kaj ant, at*. Tiuj sufiksoj estas inversaj, ĉar: **konstru'i** = <iĝi konstru'anta> aŭ <igi konstru'ata>; alivorte:

**konstru'i** = **konstru'ant'ig'i** = **konstru'at'ig'i**,

simile:

**bel'a** = **bel'ig'int'a** = **bel'ig'it'a**.

Do la verbaj sufiksoj **ig**, **iĝ** nuligas la participajn sufiksojn **at**, **ant**, aŭ reciproke; tiamaniere, ke: **ant** + **iĝ** = **iĝ** + **ant** = 0, kaj **at** + **ig** = **ig** + **at** = 0.



## §42. (Rilatoj inter Substantivo, Adjektivo kaj Verbo)

Oni vidis (§15), ke la Adjektivo kaj la Verbo estas formoj simetriaĵoj kompare al Substantivo: **reĝ**, **reĝ'a**, **reĝ'ec'o**; **reĝ**, **reĝ'i**, **reĝ'ad'o**. Oni povas diri, ke Substantivo estas la «substanco», la «korpo» de la parolo, dum Adjektivo kaj Verbo estas kvazaŭ la du flugiloj, kiuj donas vivon al tiu korpo per aldono de «kvalito» kaj «ago».

Oni povas transiri senpere de Substantivo al Adjektivo, aŭ reciproke: **reĝ**, **reĝ'a**; **bel**, **bel'o**; ankaŭ, de Substantivo al Verbo, aŭ reciproke: **reĝ**, **reĝ'i**; **konstru**, **konstru'o**. Sed de Adjektivo al Verbo la transiro ne estas senpera, ĉar oni devas montri, ĉu la transiro okazas en senco aktiva, aŭ en senco pasiva.

Por iri de Verbo al Adjektivo, oni uzas do la du sufiksojn participajn: **konstru'ant'a**, **konstru'at'a'**; kontraŭe por iri de Adjektivo al Verbo oni uzas la du verbajn sufiksojn (**ig**, **iĝ**): **bel'ig'i**, **bel'iĝ'i**, kaj tio klarigas, kial la sufiksoj **ig**, **iĝ** estas inversaj je la sufiksoj **at**, **ant**.

Resume, oni povas montri la rilatojn inter Substantivo, Adjektivo kaj Verbo per la jena figuraĵo:

- 1 Estas vere, ke la adjektivo **konstru'a** ekzistas (vidu §16), sed tian adjektivon oni povas uzi nur, se la ideo de aktiveco aŭ de pasiveco estas memevidenta aŭ sufiĉe elvokata de la kunteksto.



Tamen, ekzistas nenia diferenco inter analizo de vorto **homo** kaj tiu de vortoj **bluo** aŭ **skribo**.

1. *Analizo de **homo***. Laŭ zoologia vidpunkto, <homo> estas <dupiedulo> aŭ, se oni preferas, <vertebrulo>; kaj tio signifas, ke <ĉiuj homoj estas vertebruloj>, aŭ ke la ideo <vertebrul> estas entenata en la ideo <hom>. Simile, la ideo <vertebrul> entenas la pli ĝeneralan ideon de <ul'o>, ĉar ĉiuj vertebruloj estas uloj; siavice, ĉiuj <ul'o'oj> estas <aĵ'oj>, <konkretaĵ'oj>; kaj fine, ĉiuj <konkretaĵ'oj> estas <oj>, t. e. <ekzistaĵ'oj> (en plej ĝenerala senco, konkreta aŭ abstrakta).

De tio sekvas, ke la vorto **homo**, kvankam unusignifa, estas diverssenca laŭ la kategorio al kiu oni ĝin komparas. Radiko **hom** entenas la ideojn: **hom(vertebrul)(ul)(konkretaĵ)(o)**, la vorto **homo** povas do havi la pli kaj pli ĝeneralajn sencojn: **hom'o** = <vertebrulo hom>, **hom'o** = <ulo hom>, **hom'o** = <konkretaĵo hom>, kaj fine: **hom'o** = <o hom>, <ekzistaĵo hom>, en plej ĝenerala senco, (konkreta, kaj abstrakta); do, la vorto **hom'o** havas ne nur diversajn sencojn konkretajn, sed en ĝia plej ĝenerala senco ĝi eĉ tuŝas la sencon abstraktan (**homeco**). Kaj tio klarigas, kial ideo per si mem konkreta povas per la kunteksto akiri kelkafoje sencon abstraktan.

2. *Analizo de **bluo***. Tiu analizo estas tute simila al la analizo de **homo**. La ideo <blu> entenas ideon de <koloro>; la ideo <kolor> entenas ideon de <ec'o>; la ideo <ec'o> entenas ideon de <abstrakt'o>; kaj fine, la ideo <abstrakt'o> entenas la ideon <o> en ĝia plej ĝenerala senco (<ekzistaĵo> abstrakta aŭ konkreta). La vorto **blu'o** estas do analizebla jene: **blu(kolor)(ec)(abstrakt)(o)**, kaj sekve, tiu vorto havas la pli kaj pli ĝeneralajn sencojn: **blu'o** = <koloro blu>, **blu'o** = <eco blu>, **blu'o** = <abstrakto blu>, kaj **blu'o** = <o blu>, <ekzistaĵo blu> (abstrakta aŭ konkreta). Do la vorto **bluo**, kvankam unusignifa, havas diversajn sencojn abstraktajn, kaj en ĝia plej ĝenerala senco ĝi eĉ tuŝas al la senco konkreta (**bluaĵo**). Tio klarigas, kial ideo per si mem abstrakta povas per la kunteksto akiri kelkafoje sencon konkretan.

3. *Analizo de **skribo***. Tiu analizo ankaŭ estas simila al la antaŭaj. La ideo <skrib> entenas ideon de <ag'o>, la ideo <ag'o> entenas ideon de <abstrakt'o>, kaj fine la ideo <abstrakt'o> entenas la ideon <o> (<ekzistaĵo> abstrakta aŭ konkreta). La vorto **skrib'o** estas do analizebla jene: **skrib(ag)(abstrakt)(o)**, kaj sekve tiu vorto povas havi la pli kaj pli ĝeneralajn sencojn: **skrib'o** = <ago skrib>, **skrib'o** = <abstrakto skrib>, kaj **skrib'o** = <o skrib>, <ekzistaĵo skrib> (abstrakta aŭ konkreta). Do, la vorto **skribo**, kvankam unusignifa, havas diversajn sencojn ab-

straktajn, kaj en ĝia plej ĝenerala senco ĝi eĉ tuŝas al la senco konkreta (**skribaĵo**), t. e. al la konkreta rezulto de la ago.

*Rimarko.* Kiam oni volas fari diferencon inter la diversaj sencoj de la vorto, oni povas uzi la pleonasmajn formojn **blukoloro**, **blueco**, **skribado**, ktp., sed tion oni ne faru sennecese (principo de sufiĉo).

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-191-7**